

LA JUNIA VIVO




ORGANO POR LA INFANOJ

T.J.O. CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO, ĜIRO 382363 • JARKOTIZO 1.- NED. GULD. AŬ EGALVALORO

KIO NUN? (Fino).

Post la enterigo venis malfacilaj tagoj por Patrino. Kvankam ĉiuj geamikoj helpis ŝiN ĉiel, kvankam venis helpo de ĉiuj flankoj:



de la parencoj, de la sinjorinoj, de la pastro, de la klientoj de Patro, de la posedanto de la aŭtomobilo, de la butikisto en la vilaĝo, ŝi tamen mem devis trovi rimedoN. Si laboris dum la tuta tago, skribis leterojN, vojaĝis al Las Palmas, petis informojN ĉie. Si ripozis neniam, ne plendis; ŝi estis ankoraŭ terure pala.

„Si ne ploris”, diras la homoj, „ŝi devas plori.”

Hodiaŭ ŝi finfine decidis. Tie ĉi ŝi ne povas resti: la luprezo de la kampo kaj de la domo

estas tre alta. Tiom ŝi ne gajnas per **sia** kudro-laboro. Si volonte irus kun la infanoj al la domo de **siaj** gepatroj en Sevilo, sed kvankam ŝia frato Gulio sendis **siaN** malmultaN ŝparmonoN al ŝi, li ne povas inviti ŝiN, ĉar li eble baldaŭ ne plu havos hejmon.

Ankaŭ ŝia frato Jacinto sendis monoN, sed li ne posedas hejmon.

Kaj Onklo Ignacio en Madrido skribis: „Kompreneble vi ĉiuj venu al ni”

Si ne povas elekti, ŝi devas iri al Madrido. Post unu semajno ili ekvojaĝos. La geamikoj ĉi tie vendos ĉioN por ŝi kaj sendos la monoN al ŝia adreso en Hispanio.

Si sidas ĉe la granda tablo. La infanoj jam dormas. Nun ŝi povas

riposti. Ŝi kaŝas la vizaĝon en la manoj. Fine venis la larmoj: nun ŝi povas plori.

Adiaŭ Insuloj de l' Feliĉo! La feliĉaj tagoj estas for. KioN alportos la estonto?

Per ĉi tiu (50-a) leciono finiĝas la daŭrigrakonto „Sur la Insuloj Feliĉaj”, verkita de Annie Rebers, kaj ilustrita de Toon Langeberg. La intenco de la verkintino estis publikigi lego-lernolibreton „La Novanoj”, konsistanta el du volumoj (po 50 lecionoj), kiuj enhavus la tutan gramatikon de Esperanto. Tiucele ŝi donis la novajn vortojn kaj gramatikaĵojn sub ĉiu leciono. Ĝis la 35-a leciono ni faris tion ankaŭ en LJV. Sed montriĝis, ke monata organo ne taŭgas per doni plenan metodon. La tempo inter la diversaj numeroj estas tro longa. De julio '47 en LJV do forrestis la gramatiko. — Sekve de tio la aŭtorino ne pretigis la duan parton, ĉar ne estis ŝia intenco nur doni legaĵon.

Ni dankas Annie Rebers pro ŝia ĝisnuna laboro, kaj ni ne povas ne esprimi nian bedaŭron ke ŝi ne rakontos al ni plu pri „La Novanoj”.

La Fromaĝfoiro en Alkmaar.

En la fromaĝfoiro estis tre amuze. La viretoj kuris en stranga maniero. Ni vidis, kiel oni pesas la fromaĝojn. Estis ankoraŭ io amuza: En la turo estas verdaj pordetoj. Kaj kiam la horloĝo batas plenan horon, tiuj pordetoj malfermiĝas, kaj aperas rajdistoj. Kaj super ili staras viro kun trumpeto, kaj tiu tiam blovas.

Ni tre ĝuis tie!

Ingrid Hazebroek (9-jara).

Aventuro apud la marbordo.

Juna knabino loĝis dum unu semajno ĉe la marbordo. La vetero estis bela kaj ŝi estis tre feliĉa dum la tuta tempo. Kvankam ŝi estis nur 14-jara, ŝi jam bone povis naĝi, kaj eĉ instruis sian amikininon.

En iu posttagmezo la patrino de la knabino sidis sur la sablo kaj ŝi vidis la du knabinojn, kiuj sen ŝuoj promenis sur la mal-seka sablejo. „Ili serĉas konkojn”, pensis la patrino, kaj baldaŭ ŝi dormetis. Post nelonga tempo ŝi vekigis kaj aŭdis la voĉon de sia filineto: „Panjo, panjo! Rigardu! Mi trovis ĉi tiun botelon en la maro, kaj ĝi enhavas paperpecon!”

Ŝi malfermis la botelon kaj eltiris la paperon; ŝi vidis la nomon kaj adreson de nederlanda knabino, kiu deziras korespondi esperante. Kiel ekscitita estis la knabino, ĉar ŝi estis jam lernanto kaj ŝi tuj aĉetis ilustritan poŝtkarton kaj sendis ĝin al sia nova amikino trans la Norda Maro.

V. Hodgetts, Birmingham (Brit.).

La kaŭzo.

La knabeto ege ploras.

„Kial vi tiom ploras?” demandas sinjorino al li.

„Ho! ĵus mi havis pomon! Kaj nun mi jam formanĝis ĝin!”

Peĉjo.

Petolema Peĉjo staras
Ĉe la bordo de la maro.
Tute nuda, ĝojsaltante
Li mokridas pri ondar.

Maro diras: „Nur atendu,
Aroganta, vi, bubeto!”
Kaj ĝi sendas tri ondegojn
Al la bord' per forta ĵeto.

Spruce knabon malsekigas
De la ondoj la unua.
Malafable terenĵetas
Tamen lin la ondo dua.

Tria ondo, ŝaŭmportanta,
Lin per akvo superŝutas,
Kaj la tutan knabon kvazaŭ
Sammomente ĝi englutas.

Tio ne al Peĉjo plaĉas
Kiel laŭvizaĝ' mi vidas.
Li eliĝas tutmalseka —
Kaj la ondoj ĉiuj ridas.

Nun la knabo ofendita
Krias laŭte al la maro:
„Kiel viro kaj ŝipestro
Ridos mi pri vi, ondar!”

Fr. Hahn, Bremen, Germanujo.

Praktika Rimedo.

Fremda sinjoro vizitis avarulon. Li invitis lin iri kun li por manĝi. La avarulo ĝoje akceptis la proponon. Sed li petis, ke la sinjoro iom atendu: Antaŭ ol ili foriros, li devos kapti muŝon. Kvankam la fremda sinjoro tre miris pri tio, li diris nenion. Fine la avarulo kaptis la muŝon. Kiom granda estis la miro de la sinjoro, kiam li vidis, ke la avarulo metas la muŝon en la sukerujon.

Li demandis: „Kial vi faras tion?”

„Tion mi rakontos al vi”, respondis la avarulo kun triumfa rido,
„Mi volas scii, ĉu miaj servistoj ŝtelas sukeron”.

Logika Ago.

La riĉa fabrikisto Traube volis, por komerca afero, flugi de Berlino al Amsterdamo. Kiam li en la posttagmezo volis forveturi per sia aŭtomobilo al la flugkampo, venis la nokta gardisto de lia fabriko kaj diris al li: „Estimata sinjoro, mi ĵus aŭdis, ke vi hodiaŭ volas flugi al Amsterdamo. Sed en la lasta nokto mi sonĝis, ke ĉi tiu aviadilo falos malsupren, kaj ke ĉiuj pasaĝeroj pereos.”

S-ro Traube estis tre superstiĉa, kaj li vojaĝis per la trajno. En Kolonjo li aĉetis vespergazeton, kaj subite li legis, ke la menciita flugmaŝino falegis malsupren pro fulmotondro, kaj ke ĉiuj ensidan-

toj mortis. Nun s-ro Traube kompreneble tre ĝojis, kaj kiam li revenis el Amsterdamo li donacis al la nokta gardistoj pli ol mil markojn. Sed — samtempe li eksigis lin.

G. Schaedel, München, Germ.

Kial s-ro Traube maldungis la gardiston??? Inter tiuj, kiuj informos nin pri tio ni lotumos premion.

La solvo de la enigmo en la junia No. estas:

Internacia Lingvo. — il, tero, anonci, valo, vi, angilo. La premion gajnis: s-ino Luyting en Zd. Scharwoude (Ned.).



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

en Groet (4-11 Aŭg. '48).

Amaso da lignaj konstruaĵoj malantaŭ alta barilo, ĉe la piedo de belegaj dunoj jen la unua impresoj, kiam ni post iom da serĉado trovis la lokon de nia I.J.K. „Ĉu tie ni devos loĝi?? Jes, efektive, jam ni vidas la verdan flagon!

Iom hezite ni iras al la mallarĝa pordo. Sed jam ni vidas geamikojn, kaj samtempe ni estas „hejme”. Ni plenigas niajn pajlosakojn, portas ilin al la dormejoj. Grandegaj ĉambroj, kun duetaĝaj litoj, kio vespere kaŭzas multe da plezuro. Poste al la kuirejo, kie regas „onklo Jakobo”, kun la bela blanka ĉapo. Grava persono li estas: dum la tuta semajno li regalis nin per la plej bongustaj manĝaĵoj. Fine al la manĝejo: bela salono kun granda scenejo, ornamita per esperantaj flagoj kaj floroj. Kaj jen ni estas meze de junular-kunveno: bruoj, rido, ĝojoj! Ĉeestis 285 junuloj kun siaj gvidantoj el: Francujo, Anglujo, Skotlando, Kimrujo, Belgujo, Nederlando, Svisujo, Italujo, Germanujo, Svedujo, Argentino. Vere internacia familio! Kiom multe oni spertas en tia kunveno! Tro rapide pasas la tempo! Ne eblas raportoj pri ĉio, la memoroj ankoraŭ kirliĝas en la cerbo: Nomoj, vizaĝoj, promenadoj en la belegaj dunoj, al la marbordo, prezentadoj sur la scenejo, ŝipveturado, laborkunsidoj, la vizitoj al Alkmaar, Edam, Volendam, la neforgesebla gastameco en Edam, ĉio sur fundo de amikeco Ho jes, amika la sfero ĉiam estis, malgraŭ la fakto ke inter la ĉeestantoj estis komencantoj, kiuj ne bone parolis Esperanton. Espereble por ili la kunveno estis stimulo al studado, ĉar tro da komencantoj en internaciaj kunvenoj povus fariĝi ĝene. Prave s-ro Parker en la laborkunsido rimarkis tion. Li eĉ proponis ekzameneton por esplori la parolkapablon de la partoprenantoj al venontaj kunvenoj. Ĉu necese?

Multe tro rapide venis la adiaŭo. Ĉu adiaŭo??? Ne! Ĝis revido!
Ĝis revido en Versailles!

N. K.

En la kunvenejo en Groet postrestis diversaj objektoj. Kiu perdis aŭ for-
gesis ion skribu pri tio al S-ro Bant, Wagemakersweg, Groet, Nederlando.

Peto: De la lasta Internacia Junular-Kunveno ne estas farita filmo, ĉar
nia filmisto, s-ro Schut, ne ĉeestis. Sed ni nun proponas, ke ĉiu, kiu faris
fotojn dum la kunveno, sendu unu ekzempleron al TJO-Centro en West-
Graafdiijk. Ni tiam farigos de tiuj fotoj bildfilmon (nemoviĝantan filmon),
por ke tamen restu memoraĵo pri la kunveno, kiun ni montros en la venonta
IJK! Sed nur klaraj bildoj estas uzeblaj. Kiam vi opinias la sendadon de
fotoj tro multekosta, vi bonvolu sendi la negativojn.

Ni fidas je via helpo!



Partoprenantoj en la I.J.K. en Groet (4-11 aŭg. '48).

Nederlandanoj, ĉu vi jam mendis kvanton de „De Esperantist”? La Septembro-numero ĵus aperis. Ĝi estas 8-paĝa. Bonega propagandilo. Pli ol 5000 ekzempleroj estis antaŭmenditaj. Mendu ĉe TJO-Centro!



T.J.O.-RUBRIKO.

Sekr. Arie Schouten, No. 122, Oosthuizen, Nederlando.

Raporto pri la laborkunsido de T.J.O. je 8-8-'48, en la Int. Junular-Kunveno en Groet.

Ceestis membroj el Britujo, Belgujo, Francujo, Italujo, Nederlando kaj Svedujo.

La prezidanto malfermis la kunvenon per parolado en kiu li skizis la dek jarojn da TJO-laboro.

Dum la traktado de la raportoj ni aŭdis, kiel muzikon, la zumadon de la festantaj junuloj en la apuda granda salono. Sinsekve ili prezentis ion sur la scenejo, kaj la muziko, aplaŭdoj kaj kantoj, kiuj penetris en la laborkunsidon, donis al ĝi apartan sferon. Estis kvazaŭ atentigo de la infana parto, ke por la bono de ili okazu la diskutoj.

La raportoj de la sekretario-kasisto aklame estis akceptataj kaj per tio la ĝenerala estrara agado. Ankaŭ la redaktado de „La Juna Vivo” estis aprobata, kun nur la voĉo de s-ino v. Veenendaal kontraŭ. Ĉe la traktado de la filmservo montriĝis, ke la 8 mm largeco de la TJO-filmoj estas maloportuna por multaj landoj. Oni klopodos trovi rimedojn por fariĝi 16 mm filmon. Ĉar tiuj estas pli multekostaj, tio ne estos facila problemo. — La prezidanto mallonge parolas pri „Denaska Esperantistaro” en T.J.O. Oni daŭrigos en la sama maniero. — Per kelkmomenta silentado ni memoris la fondinton de D.E.: Pra-onklon Robertson.

Ĉar laŭ la estraro redivido de la taskoj estas necesa, kaj ĉar necesis aldoni novulojn al ĝi, oni elektis Arie Schouten por la funkcio de sekretario kaj Henk Uittenbogaard por alia estrarfunkcio.

Por la I.J.K. 1949 envenis tri proponoj: de la franca sekcio por Versailles, de Henk Uittenbogaard por la Rejnlando en Germanujo, kaj Kon Walsh proponis lokon en Britujo. Post iom da diskutado oni decidis okazigi ĝin en Versailles en Francujo.

Principe estis akceptata la propono ke partoprenontoj en I.J.K. antaŭe devos trapasi ian ekzameneton.

Plue oni proponas en ĉiu IJK fiksi kelkajn horojn por diskutadi iun, aŭ plurajn temojn, kiu(i)n oni antaŭe mallonge enkondukis.

Kiam LJV aperu daŭre en la nuna formato, nepre necesas pligrandigi la leŭtantaron. La tuta TJO-anaro, speciale en tiuj landoj, el kiuj TJO povas akiri monon, energie laboru por tio.

Dankante ĉiujn pro la ĉeesto kaj vigla partopreno en la TJO-laboro, la prezidanto fermis la kunvenon.

M. v. d. Horst.

Al ĉiuj, kiuj sendis salutojn kaj bondezirojn al la kvara Int. Junular-Kunveno de TJO la estraro estas danka. Pro la granda nombro ne eblas respondi aparte.

Francujo: En interkonsento kun s-ino Turin, la ĝisnuna ĉefperantino, s-ro Bizet fariĝis ĉefperanto. Vi bonvolu bone noti lian adreson: **s-ro Roger Bizet, Wierre-au-Bois, par Samor, (Pas de Calais)**

Ni trege bedaŭras ke s-ino Turin, kiu plenumis sian funkcion ekde la fondiĝo de TJO, pro familiaj cirkonstancoj devas forlasi ĝin.

Ni elkore dankas ŝin pro la multega laboro, kiun ŝi faris en la intereso de nia movado, kaj esperas, ke ŝi provizore tamen helpos s-ron Bizet.

Italujo: Oni oficiale starigis italan sektion de T.J.O. Sub respondecado de la ĉefperanto funkcios provizora p'enumkomitato, konsistanta el tri personoj: d-ro Chiussi Italo, prez.; f-ino Fioretta Dusa, sekr.; s-ro Guido Gu'li, kasisto; ĉiuj en Trieste. Oni planas eldoni propran bultenon. Niajn gratulon kaj bondezirojn al la nova sekcio!

KOESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Belgujo: S-ro Dussart Camille, Gare d'Oret, Morialmé (Namur), dez. interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun la tuta mondo.

Ĉeĥoslovakujo: Pli ol 50 fraŭloj (16-29-j.) dez. kor. kun fraŭlinoj. Skribu al Vilem Krause, Strojné 2, Plzen-Karlov.

20-j. fraŭlo deziras kor. kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. Pflieger František, loka peranto de TJO, Loucovice 13.

14-j. knabo dez. kor. kaj interŝanĝi poŝtkartojn kun ĉiuj landoj. Resp. certa, Jarmila Sobotková, Radonice 107 u Kadani.

Kiuj fakuloj volas korespondi pri psikologiaj problemoj, psiĥo-teĥniko, mensaj higieno kaj gimnastiko? Adreso: Centra Libraro Bata-Svit. Oni skribu esperante, angle aŭ germane.

Francujo: F-ino Belhomme Yvonne, 5 rue Dom Calmet, Nancy (M.M.), dez. kor. kun ĉiuj landoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Mourlon, Gérard, 116 r. Charles Keller, Nancy (M.M.) dez. kor. kun ĉiuj landoj. Interŝ. poŝtm. (Sendus pm. Francujo kaj Sarre). Resp. certa.

Instruisto kaj 10 lernantoj (12-14-j.) dez. kor. k. la tuta mondo. Skribu al S-ro Contart, lernejestro, Lens, Fosse 11, Pas de Calais.

Germanujo: 19-jara gimnaziano dez. kor. kun eksterlandanoj. Herbert Metz, (22b) Birresborn, Eiffel.

F-ino Hildegund Zeick, (16) Heppenheim/Bergstr., Friedrich-Ebertstr. 33, dez. kor. k. interŝ. poŝtm., ktp. k. ĉ. l. Respondo certa.

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj k-ino Annelie Haas, Koln-Riehl, Gierkestr. 43.

Antonie Meurel, 21-j. knabino, (13b) München 9, Zasingerstr. 2, deziras korespondi pri aktualaj temoj.

Winfried kaj Josef Hoesek, Am Bertholdshof 5, (21b) Dortmund, deziras korespondantojn por komencantoj kaj progresintoj (12-40-j.).

Ursula Rickman (13-j.), Sterie 64, kaj Marlies Kroll (13-j.), Lenninghausstr. 31, ambaŭ en Dortmund-Schürer, deziras korespondi.

Hungarujo: Francisko kaj Tibor Illés (17 kaj 14-j.) dez. kor. kun la tuta mondo. Budapeŝt, XI. Bank-Ban — U. 7. III. 2.

Mihály Farkas, Szikszó, Liszt Ferenc-u. 13, 18-jara studento, deziras korespondi kun gejunuloj.

Italujo: F-ino Fioretta Dusa, Fornace I, Trieste, deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj kun ĉiulandaj geesperantistoj.

17-jara studento dez. kor. per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj kun la tuta mondo. Crovetto Carlo, Via M. Novaro, 1-11 B, Genova.

Polujo: Kiu sendos al mi 50 pm. de sia lando ricevos la saman kvanton de Polujo. Afr. fil. J. Jasinski, Pulaskiego 16, Pabianice.

16-jara skolto dez. kor. kaj interŝ. poŝtk., gazetojn, kaj skoltinsignojn. Stawomiv Hans, Pabianice, Zamkowa 7.

Helpo bezonata. — Por eldonota libro pri ĵaz- kaj swing-muziko, la aŭtoro bezonas informojn pri muziko en ĉiuj landoj. Ĉiu helpanto ricevos tujan respondon, kaj reciprokan informon. — J. Kon Walsh, Esperanto-House, Leopold St., Leeds 7, Anglujo.

<p>KURSGVIDANTOJ! Bonegan materialon vi trovas en la de J. Muusses, Purmerend, eldonitaj lernolibroj:</p> <p>Internacia Lernolibreto „La Juna Vivo” 0,50 gld.</p> <p>Apartenanta vortlisto (speciale por nederlandanoj) 0,15 guld.</p> <p>„Sub la Verda Standardo” (plena metodo, konsistanta el: Gvidilo (nur por la gvidanto) ... 2,50 gld.</p> <p>„Laboriloj” I kaj II, po 0,90 „</p> <p>„Memorigilo” 0,50 „</p> <p>Mendebloj ĉe TJO-Centro, West-Grafdijk.</p>	<p>BINDITAJ JARKOLEKTOJ „LA JUNA VIVO”</p> <p>aĉeteblaj de la jaroj: '34/'35, '35/'36 kaj '36/'37. Perfekta materialo por komenc- kaj daŭrigkursoj.</p> <p>Prezo po 1.— guld.</p> <p>Mendu ĉe TJO-Centro!</p>
<p>INTERNACIA KULTURO</p> <p>Kultura Revuo de la Balkanlandaj Esperanto-Asocioj. Grandformata ilustrita organo, abonebla ĉe TJO-Centro, W. Grafdijk. Jarabono 6.— guld.</p>	<p>T.J.O.-BROŜURO</p> <p>Ilustrita libreto, raportanta pri la dek jaroj da T.J.O.-laboro kaj pri Denaska Esperantistaro, enhavanta liston de perantoj, kotizoj, ktp. Prezo 0,20 guld. (1 respond-kupono).</p>
<p>UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO estas la ampleksa tutmonda Esperanto-Organizaĵo, kies supertendenca, neŭtrala sinteno permesas la aliĝon de kiu ajn Esperantisto.</p> <p>Per sia delegita reto, kiu ampleksas preskaŭ la tutan mondon, ĝi donas altvaloran servon al la praktika Esperantisto, por kiu la jarlibro de UEA estas konstanta konsultilo.</p> <p>Petu senpagan prospekton ĉe UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.</p>	

Propagandu Esperanton per la T.J.J.-filmoj!!!
Adreso filmservo: H. J. Schut, Donkerbroek Fr. (Ned.) — Britoj turni sin al f-ino N. Rees, Derwydd, Seven Sisters Nr. Neath, Kimrujo.